



Brazila



Esperantisto

OFICIALA ORGANO DE
BRAZILA LIGO ESPERANTISTA

Elirante ĉiumonate — Aparecendo mensalmente

REDAKCIO—AVENIDA RIO BRANCO 153, 2.º

RIO DE JANEIRO

BRAZILIO

B. I. E.

Honora Prezidanto—*Inĝ.º Everardo Backheuser*

Prezidanto—*Inĝ.º Alberto Couto Fernandes*

Vicprezidanto—*D-ro João Keating*

1^a Sekretario—*D-ro João B. Mello Souza*

2^a Sekretario—*Inĝ.º Hernani da Motta Mendes*

Kasisto—*Edmundo Felix Tribouillet*

ENHAVO

Brazila Ligo Esperantista. IX Congresso Universal de Esperanto.—Maksimoj kaj Pripensoj. — La Violonisto. — Antaŭen kur:ĝe. — Miraklo. — Anekdotoj. — Enigma Fako. — Aos Medicos. — Peregrinação Internacional de Esperantistas Catholicos á Roma. — Brazila Gazetaro kaj Esperanto. — Kroniko. — O Esperanto no estrangeiro. — Novaj gazetoj ricevitaj. — Grupoj esperantistaj. — B. L. E. — Bibliografio.—Korespondado.—Anoncoj.

Rio de Janeiro - Brazilio

GRUPOJ ESPERANTISTAJ

B. L. E.

UNUIĜO KREAS FORTON

1906—Marto — «Suda Stelaro». Campinas—Ŝtato São Paulo—Prez. Ing^o Tobias R. Leite.

Junio—**Brazila Klubo «Esperanto»**. — Avenida Rio Branco, 153, 2^o andar, Rio de Janeiro.—Prez. Kolonelo Dr. Moreira Guimarães.—1^a Sek. H. Motta Mendes.

1907—Septembro—**Esperanta Klubo—Aracajú**—Ŝtato Sergipe—Prez. D-ro Alcibíades Corrêa Paes — 1^a Sek. Sebastião d'Albuquerque.

1909 Julio—**Norda Matena Stelo**. — Tamoyos n. 41 B. Belem, Ŝtato Pará.—Prez. Anna Sarah de Mattos.

1910—Julio — **Grupo Esperantista de Juiz de Fóra**.—Juiz de Fóra — Ŝtato Minas Geraes.—Prez. Paulino Bandeira.

Novembro—**Esperantia Grupo de Bahia**—Ŝtato Bahia.—Prez. Kolonelo Deraldo Dias.

Dezembro—**Brazila Esperantista Klubo**.—Quitanda 47. — Rio de Janeiro — Prez. Giovanni Leoni—1^a Sek. Rinaldo de Souza.

1911—Januaro.—**Societo Esperantista Doktoro Baena**.—Belem. Ŝtato Pará—Prez. Dr. João Pedro de Figueiredo.

Aŭgusto—**Samideaninaro**.—Aracajú—Ŝtato Sergipe.—Prez. F.^{ma} Sylvia de Oliveira Ribeiro.—1^a Sek. Norma Reis.

1912—Aŭgusto—**Virina Klubo**.—Strato General Severiano, 170—Rio de Janeiro. — Prez. S.^{ino} Maria Chalréo.—1^a Sek. F.^{ino} Julia Fernandes.

Ni publikigas nur la nomojn de la grupoj kiuj aliĝis al **Brazila Ligo Esperantista** aŭ helpis **Brazilan Esperantiston**.

*A Brazila Ligo Esperantista (Liga Esperantista Brasileira) cuja directoria é annualmente eleita pelo Congresso tem por fim dirigir a propaganda do Esperanto no Brazil em questões de interesse geral, proceder a exames de Esperanto, dar diplomas de professores, auxiliar os grupos e representar em qualquer emergencia a opinião dos esperantistas brasileiros.

SÊDE—Rio de Janeiro.

COTISAÇÃO ANNUAL. Cada grupo que adherir paga 10\$000 por anno e elege um delegado, de preferencia residente no Rio de Janeiro. Póde o Grupo escolher mais de um delegado, pagando nessa hypothese 10\$ cada um.

Qualquer pessoa póde isoladamente adherir á Liga, pagando a annuidade de 5\$. Não ha joia.

VANTAGENS. Os grupos que adherirem á Liga gozarão das seguintes vantagens :

a) Recebem gratuitamente o «Brazila Esperantista» e para os socios com abatimento de 20 % do preço da assignatura annual ;

b) Por intermedio dos seus delegados são informados das decisões da Directoria da Liga na quaes tomam parte;

c) Gozam de abatimento nas edições da Liga e nas encomendas que por meio della fizerem de obras esperantistas ;

d) Recebem da Liga todo o auxilio que esta lhes puder prestar, em beneficio da propaganda e diffusão do Esperanto ;

e) Podem publicar no orgão official da Liga informações mensaes sobre o movimento esperantista local.

NOTA.—A Liga não intervem em assumptos referentes á vida interna dos grupos filiados, podendo estes agir livremente de accordo com os fins para que foram creados.

Das vantagens c, d e e gozam tambem as pessoas que adherirem isoladamente á Liga, as quaes recebem o «Brazila Esperantista».

As pessoas que desejarem adherir á Liga devem dirigir-se ao Sr. E. FELIX TRIBUILLET, thesoureiro. Avenida Rio Branco 153, 2^o andar. O remettente receberá o cartão de membro da Liga.

Quanto á adhesão dos grupos e demais informações, dirigir-se ao Sr. J. B. MELLO e SOJZA, 1^o Secretario.

BRAZILA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO
de "BRAZILA LIGO ESPERANTISTA"

5-a Jaro

Junio—1913


Numero 2

JARABONO
En Brazilio 3\$000
Eksterlande 5 fr. (2 Sm.)

Elirante ĉiunonate—Apparecendo mensálmente
REDAKCIO — AVENIDA RIO BRANCO, 153 2.º ANDAR
RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Specimeno 0, fr. 50 (0. Sm. 20)
Num. avulso 300 réis
Helpabono 10\$000

RIO DE JANEIRO



VOJAĜO AL «MONTO CORCOVADO»

Brazila Ligo Esperantista

Adheriram á «Brazila Ligo Esperantista» no corrente anno o grupo *Norda Matena Stelo*, do Pará e o Sr. *Fayme Martins de Souza*, de Bahia.

ATESTO PRILERNADO.—Continuam a ser distribuidos pela B. L. E. os *atestoj pri lernado* ás pessoas que já prestaram nos respectivos grupos o necessario exame elementar de

Esperanto. Chamamos a atenção das Directorias dos grupos para a conveniencia da expedição de diplomas, cuja taxa actual é de 1\$000, pertencendo a metade dos emolumentos arrecadados ao grupo que promover a realização dos exames.

Pedimos insistentemente aos esperantistas isolados e aos Srs. secretarios dos grupos, que nos enviem sempre noticias sobre o movimento e propaganda nas suas cidades para que as possamos publicar na nossa *Kroniko*.

IX Congresso Universal de Esperanto

Faltam apenas dois mezes para iniciar-se a grande festa annual dos esperantistas. Grande tem sido o trabalho da comissão organizadora. Segundo o programma provisorio, as sessões solemnes de abertura e encerramento do congresso terão lugar nos dias 24 e 30 de Agosto, realisando-se no dia 25 a sessão inaugural do congresso da Universal Esperanto-Asocio (U. E. A.). Haverá no dia 24 officios divinos nas egrejas catholica, protestante e hebréa, e no dia 26 uma bellissima excursão aos pontos mais altos e mais bellos dos Alpes. Na noite de 28 terá lugar no esplendido salão do Novo Casino o baile internacional, no qual os congressistas se apresentarão em costumes nacionaes.

Será tambem levado á scena o drama «La Patreco», traduzido do original suisso pela *sami-deanino* M. Wolf. Durante a semana do congresso realisar-se-ão muitas festas, concertos, passeios pela cidade, conferencias com projecções luminosas, etc.

A chave de ouro do congresso será uma grande reunião dos congressistas no Monte Gurten, a qual terá lugar no dia 31 de Agosto e constará de exercicios da Cruz Vermelha, banquete de mais de mil talheres, grande festa popular suissa com concertos, jogos, luctas, etc.

Tudo nos leva a crer que o 9º Congresso Universal de Esperanto terá um successo extraordinario e será mais um triumpho a juntar aos anteriores.

A. C. F.

Maksimoj kaj Pripensoj

(El «Biblioteca Internacional de Obras Célebres»)

Eĉ en la suno de nia vivo estas ĉiam nigra makulo, kiu estas nia propra ombro.—*Carlyle*.

Mi edziĝas preferinde kun malgranda virino ol kun granda—ĉar el du malbounoj, la pli malgranda.—*Commerson*.

Bona portreto estas pentrita biografio.—*Anatole France*.

Eĉ la gloro necesas konsolon.—*Forge Eliot*.

La necerteco de la feliĉo estas pli krudela ol la certeco de la malfeliĉo.—*Henri Conscience*.

La kritiko multfoje eltiras samtempe el la arbo la vermojn kaj la burĝonojn.—*Reihter*.

Tio, kion vi pensas, apartenas al ĉiuj, nur estas via tio, kion vi sentas.—*Schiller*.

Ni respektegas malnovan arbon kiel templon, pli ol templon; ĉar la mono povas starigi ian ajn monumenton kaj neniu potenco povas krei vivantan arbon.—*Sarrazin*.

Ĉiuj feliĉoj similas unu la alian, sed ĉiu malfeliĉo havas sian apartan fizionomion.—*Tolstoj*.

Ĉiu popolo mortas post la morto de ĝiaj grandaj arbaroj.—*João Lahor*.

(Tradukis A. C. F.)

LA VIOLONISTO

LAŬ GUERRA JUNQUEIRO

Iam, en tempo tre malproksima, la loĝantoj de ia granda urbo starigis riĉan preĝejon al Sankta Cecilio, patronino de l'muzikistoj.

La vestoj de l'sanktulino estis el arĝenta filigrano, kaj la ŝuetoj el oro, faritaj de l'plej bona orajisto, kiu estis en la urbo.

La plej ruĝaj rozoj kaj la plej blankaj lilioj ornamadis la altaron.

La preĝejo estis iam plena je gepilgrimantoj kaj gereligiuloj.

Iun fojon pilgrimis tien malriĉa, pala, malgrasa, kaj kvazaŭkadavra violonisto. Tial, ke la vojiro estis longedaŭra, li multe laciĝis kaj en lia tornistro jam ne troviĝis pano, nek en la poŝo mono por ĝin aĉeti.

Tuj post sia eniro en la preĝejon li komencis ludi je sia violono, tiel dolge, tiel lerte, ke la sanktulino kortuŝiĝis, vidante lin tiel malriĉa kaj aŭdante tiun agrablegan muzikaĵon.

Kiam li finis, Sankta Cecilio malleviĝis, deprenis unu el siaj riĉaj oraj ŝuejoj, kaj ĝin donis al la malriĉa muzikisto, kiu, kun ĝoja frenezo, dancante, kantante, plorante, rapide alkuris al orajbutiko por ĝin vendi.

Rekoninte la ŝuon de l'Sanktulino, la orajisto arestis la malfeliĉan violoniston kaj lin kondukis antaŭ juĝiston.

Li estis procesita, juĝita kaj kondamnita je morto.

Fine alvenas la tago fiksita por la mortigo.

La sonoriloj funebre sonoradas kaj la sekvantaro ekmarŝas je la sono de religiaj kantaĵoj, kiuj, tamen, ne prosperas neaŭdebligi la violonon de l'kondamnito, kiu petas, kiel lastan favoron, ke oni lin permesu ludi, ĝis la lasta momento, sian violonon.

Jen alvenas la sekvantaro antaŭ la preĝejon de l'Sanktulino kaj, kiam ĝi haltas, la

malĝoja malfeliĉulo petegas, ke oni lin konduku internen, por ke tie li ludu sian lastan melodion.

La pastroj kaj la ĉefoj de l'eskorto konsentis; la violonisto eniris, surgenuiĝis apud la Sanktulino, kaj, ploregante, komencas ludi.

Jen la popolamaso kun mirego kaj timo ekvidas Sanktan Cecilion ree kliniĝi, forpreni la alian ŝuon, kaj ĝin meti en la manojn de l'malfeliĉa muzikisto.

Post tiu miraklo ĉiuj ĉeestantoj kunportas triumfe la violoniston, lin kronas per flo-roj, kaj la magistratoj solene venas tributi al li la plej honorigajn respektojn.

Esperantigis

SEBASTIÃO DE ALBUQUERQUE.

Antaŭen kuraĝe

Sur maro ŝaŭmanta
Naĝadas ŝipeto,
Ĝin gvidas, brilanta,
La verda steleto.

Kuraĝaj maruloj
Remadas konstante;
Obstinaj gajuloj
Laboras kantante.

Kaj ondoj, kolere,
Senfine bruegas,
Sed ĉiam fiere
Sipet' rapidegas.

Ni same, kuraĝe
Antaŭen iradu;
Fidelaj, ni saĝe
Sen tim'bataladu!

Kaj fratoj amataj,
Kun nobla fiero,
Ni venkos, helpataj
De l' sankta Espero!

S. Franz.

(El «L'Esperantiste Catholique».)

La ondoj serĉas la bordon,
La sunradioj la floron,
La birdoj serĉas la nestojn
Kaj mi nur vian la koron.

MIRAKLO

En nokto malluma, sub vento terura,
La veloj ŝiritaj, la mastoj rompitaĵoj.
Sur maro perfida, de ondoj ludilo,
Sen lumo saviga, sen kredo, sen fido,
Gracia galero, beleta ŝipego,
Venkinta, fiero, kun ŝarĝo riĉega,
Humila hodiaŭ, hieraŭ vantema,
Sen nordo, al morto alkuras freneze.

Al kiu por helpo, por savo petegi?
Al kiu por amo? Al kiu feliĉe
Sin turni? Cu sorto severa ne volas
Kompate, ke hejmen revenu ŝipanoj?
Okuloj ne vidas; oreloj nur venton
Mokeman, minacan, fortegan, mortigan.
Saŭdadoj profundaj la korojn elpremas,
Similaj al ŝtono de blanka tombejo.

La vento blekegas senbride, kolere,
Sur ponto kruela aperas timeme,
Kun sekaj okuloj, la lipoj tremantaj,
Virino palega, kun filo sur brako
Senscie kuraĝa ĉe l'vido de l'maro:
« Rapide pereu la ŝipo, pereu
La mondo, mortiĝu la suno, la steloj;
Saviĝu infano senpeka la mia ».

Pliiĝas la vento, la ondoj multiĝas.
Rifaro avida atendas kaptajon.
Proksime, ankoraŭ cent metroj, rompiĝos
La homoj, virino, infano, galero.
Jam alproksimiĝas momento fatala,
Jam tuŝas la ŝipo la rifojn mangemajn,
Pliiĝas la vento, la ondoj grandiĝas,
Fantomo terura finigos turmenton.

Tre alten, altegen, la ondoj leviĝas,
Portante ĉielen mizeran la ŝipon.
Kriego funebra superas ventegon,
Ventego kolera respondas terure.
« Patrino, vi diras, ke Dio ĉeestas
Sur kampo, sur astro, sur tero, sur maro.
Lin al mi ekmontru, neniam Lin vidis... »
Ne finis la frazon infano senpeka.

Kun grada bruego, kun grada frakaso,
Miranda ĵonglaĵo de granda lerteco,
Trans rifo saltegas fiero galero,
Sur lako trankvila, kviete ankriĝas.

La Forgesito

Anekdotoj

—Atentu, ke mi jam havis la honoron ludi kartojn kun reĝo.

—Vere granda afero! Mi jam ilin ludis, multfoje, kun tri reĝoj kaj... unu aso.

Letero de abonanto de ĵurnalo:

S-ro Redaktoro.—De dudek jaroj mi estas fidela leganto de via ĵurnalo: bedaŭrinde mia vidado ekmalfortiĝas. Ĉu ne estos eble presi mian ekzempleron per pli granda preslitero?

Ĉu vi vidas tiujn nubojn tre grandajn tie, post la monto?

—Jes, sinjoro, mi ilin vidas.

—Nu, ĉiam kiam vi ilin vidis sabate, la sekventa tago estas dimanĉo.

Estas strange, diris invitito al alia dum edziĝa festeno, la novedzo nur malfermas la buŝon por manĝi.

—Ha! mia amiko, la grandaj doloroj estas mutaj!

F.

Ŝparema. — La edzino de S-ro Ŝparovski estas tre malŝparema. Ŝia edzo ĉiutage devis pagi novajn ŝuldojn faritajn de sia edzino.

Foje S-ino Ŝparovski «kvazaŭ ŝparis». — Jen kion ŝi diris al sia edzo:

—Karulo, hodiaŭ mi faris bonan aferon: mi vendis mian fortepianon, por ducent spesmiloj.

—Ha! — ekkriis S-ro Sparovski, — ne kredeble! Vi, kiu neniam ŝparis, vi vendis vian fortepianon, kiun mi aŭdi tiel malŝatis, por rehavi la monon kiun...

—Sed, lasu min fini,—diris la edzino, — mi vendis tiun fortepianon, kaj aĉetis alian, pli belan, por kvincent spesmiloj, kaj tiamaŭ vi ŝuldas nur tricent spesmilojn.

(*P. J. de Lengyel.* El «Juna Esperantisto.»)

Enigma Fako

MONATA KONKURSO

JUNIO

ENIGMO 1 (*Silaboj*)

Speco de argumento.....	—	—	—
Besto.....	—	—	—
Vidilo.....	—	—	—

ENIGMO 2 (*Literoj*)

Kun *b* estas malhelpo

» <i>c</i>	»	monarĥo
» <i>ĉ</i>	»	veturilo
» <i>f</i>	»	ago
» <i>h</i>	»	en la kapo
» <i>j</i>	»	spaco da tempo
» <i>l</i>	»	mevo
» <i>m</i>	»	akvamasego
» <i>p</i>	»	duo
» <i>t</i>	»	pezo

ŜARADO 6

La prepozicion oni manĝas kun bongusta frukto. 1-2.

ŜARADO 7

Mi kaj vi eniris en la subteran etaĝon kaj trovis metalon. 1-2.

SARADO 8

Mi neas, ke tiu trinkaĵo estas mia parenco. 1-2.

X.

Ciudumonate ni donas lote du premiojn al la divenintoj de niaj enigmoj.

La solvoj de la supraj enigmoj aperos en la ĉiugusta numero.

Iu.

ENIGMO

Sekvantan tre interesan ludon oni povas legi en la «Archiv der Mathematik und Physik».

Oni skribu triciferan nombron, ekzemple 249
Ŝanĝu la unuan ciferon kun la lasta.... 942

Subtrahu la malgrandan nombron de la pligranda..... 693

Ŝanĝu ree la unuan kun la lasta cifero.. 396
Nun sumigu la du lastajn nombrojn kaj

vi ricevos..... 1.089

Tiun ĉi nombron oni ĉiam ricevas per kia ajn tricifera nombro oni komencas.


Se oni pravas per kvarcifera nombro oni ricevas 10.989.

Per kvincifera nombro oni ricevas 109.989 ktp. Oni vidas ke la du antaŭaj kaj du lastaj ciferoj ĉiam estas la samaj, nur la naŭoj plimultiĝas. En la komenca nombro la unua kaj la lasta cifero devas esti malegalaj.

Tradukis Prohme, Warnsdorf.

(*El la Marto-Haida.*)

RIO DE JANEIRO



En la fondo vidigas la monto *Sukerpano* kaj la monteto *Gloro*

CHAVES DE ESPERANTO

4\$000 0 CENTO

AOS MEDICOS

CIRCULAR

Se ha profissão em que o Esperanto é utilissimo, é a profissão medica. Quando o Esperanto fôr mais espalhado entre os medicos, não se verão mais estes congressos, um tanto comicos, em que cada scientista fala na lingua nacional e só é comprehendido por seus conterraneos. As importantes obras medicas de todas as nações serão traduzidas ou resumidas em uma só lingua — o Esperanto; inadiavelmente serão comprehendidas e poderão ser copiadas por jornalistas de todo o mundo. Os medicos se podem corresponder de uma a outra terra, sem traductores e consultar-se uns aos outros sobre themas scientificos, ethica, etc.

Dirão, porém, os medicos: então saber tres linguas, a franceza, ingleza, allemã, não é sufficiente?

Não, porque, exceptuando-se sua real difficuldade, o saber estas linguas não permite as relações com os russos, italianos, japonezes, etc.

Mas, dirão também os medicos, não chega o latim? Não, porque elle está muito pouco divulgado, mesmo entre os medicos; é muitissimo difficil para escrever; é falado de diversas maneiras, conforme os paizes; não é conformavel com as nossas necessidades actuaes (seria preciso crear muitas palavras novas); finalmente, a mesma palavra em latim tem frequentemente muitas significações, o que muito difficultaria as traducções.

O Esperanto é muito facil; sua grammatica não tem excepção, e um medico, depois de algumas horas pôde saber-o sufficientemente para escrever, depois de algumas semanas pôde falal-o correntemente.

Muitas vezes ouvi collegas dizer: Como comprehender-se mutuamente? O inglez pronunciará o Esperanto de uma tal maneira, o allemão de uma outra, o francez de uma terceira maneira. Não, porque em Esperanto cada letra tem sempre a mesma pronuncia. O accento tonico é em todas as palavras sobre a penultima syllaba. Também temia isto, mas convenci-me de que não era verdade, porque no Congresso de Dresde eu facilmente falava Esperanto com collegas allemães, inglezes, suecos, dinamarquezes, etc.

Durante os congressos em Cambridge, Dresde, Antuerpia e Cracovia, medicos de mais de dez nações puderam, graças ao Esperanto reunir-se e conversar sobre diversos themas.

Todos os medicos devem, pois, estudar a lingua auxiliar e concorrer para a propaganda em sua classe adherindo ao «Tutmonda Esperantista Kuracista Associação» «Associação Medica Esperantista Universal».

Dr. H. Briquet.

Peregrinação Internacional de Esperantistas Catholicos á Roma

De 4 a 12 de Setembro do corrente anno terá lugar uma peregrinação de esperantistas catholicos á Roma.

Já appareceu a 1ª circular da commissão de organização. Elle pede aos esperantistas catholicos que envidem todos os esforços para irem á Capital do mundo christão e recorda que se trata não de fazer uma *manifestação* esperantista, mas de praticar um *acto piedoso* e levar a homenagem filial do joven movimento esperantista ao chefe de todos os catholicos.

Póde-se desde já encommendar o *membra karto*, cujo preço á de 5 francos, á thesoureira: Mlle. Marie Larroche, 55, rue de Vangirard, Paris. Cada congressista receberá gratuitamente 50 sellos e 2 cartões postaes de propaganda.



Brazila Gazetaro kaj Esperanto

Brazilaj gazetoj kaj revuoj, kiuj dum la monatoj Februaro, Marto, Aprilo kaj Majo aperigis artikolojn kaj informojn pri Esperanto:

Piauhy. — *Gazeta* (Therezina)

Ceará. — *Jornal da Manhã* (Fortaleza).

Alagôas. — *Jornal de Alagôas kaj O Mercurio* (Maceió).

Bahia. — *Diario de Noticias* (S. Salvador).

Stato Rio. — *Ribeironense* (S. José do Ribeirão), *A Paz* (Nova Friburgo), *Aurora* (Valença), *O Estado do Rio* (Parahyba do Sul).

S. Paulo. — *O Clarim* (Mattão).

Minas Geraes. — *Luz e Amor* (Rio Branco).

Paraná. — *A Republica* (Coritiba).

S. Catharina. — *O Dia kaj Jornal do Commercio* (Florianopolis).

Rio Grande do Sul. — *O Brazil Philatelico* (Cachoeira), *Eternidade* (Porto Alegre).

Goyaz. — *A Imprensa* (Goyaz).

Rio de Janeiro. — *O Imparcial, Gazeta da Tarde, O Paiz, A Noite, A União Social, Correio da Manhã, Gazeta de Noticias, O Reformador, Gazeta Suburbana, Correio da Noite kaj Mocidade.*

KRONIKO

Pará. — Aliĝis al B. L. E. la malnova klubo «Norda Matena Stelo», kaj la alia klubo en Belem «Societo Esperantista Doktoro Baena» pagis sian kotizaĵon por la nuna jaro. Korajn dankojn!

Stato Rio. — Artikoloj pri «Esperanto kaj Spiritismo», de S-ro José Tosta, aperis en la gazetoj «Aurora», de *Valença*, kaj «O Estado do Rio», de *Parahyba do Sul*.

Rio de Janeiro. — La «Instituto Polyglotico», kiu funkcias ĉe Av. Rio Branco, n-ro 90, enmetis en sian programon kurson de Esperanto, kiu tre baldaŭ komenciĝos. Al la klera direktoro de tiu Instituto, pastro Martins Dias, sendis Brazila Ligo gratulan telegramon.

— La 1-an de Junio okazis ĉe F. ino Regina N. de Barros la 8^a kunveno de «Virina Klubo», al kiuj ĉeestis multaj klubanoj kaj kelkaj esperantistoj. En la koncerto partoprenis la jenaj gesinjoroj: Dioguina C. Correia, Rachel Bessa Santos, Carmen Rocha, Regina de Barros, Cecilia Franco, Karl Herman, Ruy Pinheiro Guimaraes, Arlindo Esteves kaj Hygino Esteves. La festo finiĝis per la himno «La Espero», kantata de ĉiuj ĉeestantoj.

— La ĉiutaga ĵurnalo «Gazeta da Tarde» malfermis esperantan fakon. «Gazeta Suburbana» aperigis la portreton de nia kara samideano D-ro E. Backheuser, ŝtata deputato kaj honora prezidanto de B. L. E., kaj «Correio da Manhã» publikigis artikolon pri «Esperanto kaj Spiritismo» verkitan de F. ino Ilka Maas.

— Estas nun en Rio nia estimata kaj malnova samideano D-ro Reinaldo Geyer, ano de la Lingva Komitato.

— La 8-an de Junio havis lokon la monata tagmanĝo de la geesperantistoj de Rio kaj Niteroi. Legis la raporton pri la antaŭlasta ĉuasko S-ro H. Motta Mendes. D-ro J. Boiteux, raportanto de la lasta kunveno, forestis pro malsano. Dum la deserto S-ro Couto Fernandes toastis al la juna esperantisto Ruy Pinheiro Guimaraes, S-ro Mello e Souza al la ĉeestantaj sinjorinoj kaj D-ro Arruda Beltrão faris la honoran toston al D-ro Zamenhof.

— Funkciadas regule la kursoj direktataj de F. ino Julia Fernandes ĉe «Associação Espirita de Botafogo» kaj de S-ro José M. Tosta ĉe «Federação Espirita». En tiu lasta enskribiĝis 23 gelernantoj.

— S-ro Ruy P. Guimaraes instruas Esperanton al kelkaj el siaj kolegoj en «Lernejo Pedro II» kaj skribis propagandan artikolon en la ĵus aperinta gazeta «Alvorada».

S. Paulo. — Ankaŭ en *Mattão* la gazeto «O Clarim» komencis publikigi artikolojn por Esperantoj kaj informojn pri nia movado.

Minas Geraes. — «Luz e Amor», spirita gazeto de Rio Branco faras nun propagandon de Esperanto. La samon faras la ĵurnalo «Alavanca», kiu aperas en *S. Maria*.

S. Catharina. — Dum sia ĵusa vojaĝo al Florianopolis, nia samideano D-ro Nuno Baena vizitis la tieajn kunbatalantojn. La saman akcepton, kiel estas kutimo en Esperantujo, li ricevis de s-roj Wenceslau de Gouvêa, direktoro de la Normala Lernejo, Irineu Livramento, la sindona direktanto de nia movado en S. Catharina kaj Carl Wanneck, kun kiu li interparoladis nur en Esperanto. Kvankam malrapide, nia kara lingvo bone progresas en tiu progresema ŝtato, kaj ni esperas, ke niaj samcelanoj en laboro paca ne laciĝos. Kiel ĉie, ili disiris bedaŭrantaj, kiel malnovaj amikoj hazarde rekontantaj post longa foresto.

F.

PORTUGALUJO

Arcos de Val-de-Vez. — Post la presigo de artikoloj pri Esperanto en la lokaj gazetoj, S-ro J. M. da Silva malfermos senpajan kurson.

Funchal. — Ĉe la prezidanto de la Madejra Verda Stelo estas malfermita kurso gvidata de la prezidanto mem.

Porto. — En la grandioza konstruaĵo «Palacio de Cristal» efektiviĝis la 11-an de Majo la ĉiujara kaj belega rozekspozicio, kiu kutime estas vizitata de multaj miloj da personoj el la plej altrangaj de ĉi tiu urbo.

La saman tagon kaj en la sama loko estis starigita ekspozicio de ilustritaj poŝtkartoj interŝanĝitaj de portugaliaj esperantistoj kun samideanoj de ĉiuj landoj, por montri al la vizitantoj kiel Esperanto jam estas disvastigita.

(El «Portugala Revuo»)

O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO

Inglatera. — O jornal *Daily Citizen* publicou uma carta assignada pelo bispo Jarrow e por 34 padres, na qual declaram que a edição do *Novo Testamento* em Esperanto é um acontecimento de alto valor.

— Abriu-se em Londres um curso para policiaes e fundou-se o «Londona Esperantista Polica Societo».

Após o discurso do presidente da Brita Esp. Asocio, o Sr. H. Heldmann, eminente socio

da Junta Educadora de *Middlesex*, introduzio o Esperanto, a titulo de experiencia, em alguns de seus collegios, obtendo um excellente resultado. — O Club esperantista de Liverpool organizou uma interessante festa, á qual compareceram cerca de 300 esperantistas, destinada a dar uma idéa dos antigos torneios literarios de Galles. Foi uma cerimonia semelhante aos jogos floraes de Barcelona. Conquistou o primeiro premio o Sr. Pollard, que foi coroado *bardo*, segundo o antigo costume de Galles.

Suecia. — Apareceu uma nova revista denominada «La Espero». — O grupo «Verda Stelo», de Stockolm, tem feito ultimamente um grande progresso. Elle conta actualmente mais de 109 socios.

França. — A «Sociedade Franceza para a propagação do Esperanto» distribuiu a todos os grupos francezes um questionario, cujas respostas lhe permittiriam organizar uma estatistica do movimento esperantista na França. A estatistica organizada com os elementos fornecidos apenas por 124 grupos é, apesar de incompleta, bastante eloquente.

Funcionam actualmente 417 cursos, dos quaes 46 são feitos em estabelecimentos de instrucção. Muitos delles funcionam em salas cedidas pela Municipalidade. Em muitos grupos os *maires* são presidentes honorarios e em alguns effectivos. Em 17 municipalidades ha conselheiros esperantistas praticantes. Em tres cidades, os cursos são annunciados por meio de cartazes officiaes. Em 48 cidades as municipalidades subvencionam os grupos locaes, que tambem recebem auxilio de Camaras Commercias.

— Por occasião do ultimo Congresso da Sociedade Franceza a municipalidade de *Toulouse* recebeu oficialmente os congressistas na Camara Municipal.

Hollanda. — Abriu-se em *Amsterdam* um curso de Esperanto para guardas civis.

Allemanha. — O Dr. Stecle, deputado ao Congresso Saxonio, pronunciou um brilhante discurso em favor do ensino do Esperanto nas escolas.

China. — Fundou-se em Tientsin um novo hotel denominado «Hotelo kaj Kafejo Esperanto».

— A nova revista «*Hina Socialisto*», redigida em chinez e em Esperanto, já conta mais de 4.000 assignantes.

Estados Unidos. — Em uma das sessões da «Academy of Sciencie», de Rochester, o Dr. J. L. Roseboorn proclamou o Esperanto a lingua universal da Sciencia. *A. C. F.*

NOVAJ GAZETOJ RICEVITAJ

L'Esperanto. — Lingua internazionale. Periodico quindicinale di studio e propaganda a cura della Cattedra Italiana de Esperantoe Direzione ed Amministrazione presso l'editora A. Paolet — S. Vito al Tagliamento. Udine. Italujo. Jarabono: 1 Sm.

Espero Teozofia: Revuo de la Teozofia Esperanta Ligo (T. E. L.). Redakcio kaj Sekretariejo: 145, Boulevard Malesherbes, Paris.

Ukraina Stelo. — Monata ilustrata gazeto. Oficiala organo de «Societo de ukrainaj Esperantistoj — *Progreso*.» Redakcio: Orest Kuzma. Kolomea, 360 Nova Aŭstrio — Galicio. Jarabono: 1,400 Sm.

Koresponda Kurso. — Monata memlernilo. Redakcio: K. C. Sun. 49 Linyen rd. W. Gate. Shanghai. Ĥinujo.

La Zemuna Esperantisto. — Sola Kroatlanda Esperanto-Gazeto. Redakcio: S-ro Jakob Schneider. Karlovcié 1. p. Šimovci, Kroatlando. Senpaga.

GAZETOJ KUN KONSTANTA ESPERANTA FAKO

O Imparcial. — Grava ĉiutaga ilustrita ĵurnalo. La esperanta fako aperas regule ĉiulunde. Redakcio kaj Administracio: Rua da Quitanda, 59, Rio de Janeiro. Brazilio. Jarabono: 30\$000 (20 Sm).

A União Social. — Monata organo de la Pakajistoj de Brazila Centra Fervojo. Ĝi publikigas ĉiam kurson de Esperanto kaj informojn pri nia movado. Redakcio: Rua Senador Euzebio, n. 144, Rio de Janeiro. Brazilio.

Gazeta Suburbana. — Duonmonata ĵurnalo speciale por la loĝantoj en la ĉirkaŭ ĵoj de Rio, kun esperanta fako. Redakcio: Rua do Engenho Novo, 85. Rio de Janeiro. Brazilio.

GRAVA PETO

Dum la 19-a ĝis 21-a de Aŭgusto de l' kuranta jaro okazos en Stuttgart la 8-a germana Esperanta kongreso.

Ciu samideano sendu laŭ la adreso — «Oskar Ziegler, Heusteigstr. 56 m. Stuttgart-Germanujo» — bele ilustritan poŝtkarton (markon bidflanke) por la ekspozno tie araciivgata.

Laŭlezire li respondos per Esperantista poŝtkarto de Stuttgart.

BIBLIOGRAFIO

Ni ricevis kaj tre dankas:

Esperanta Poŝ-Biblioteko:

N.º 1. *La Premito*. — Novelo originale verkita en Esperanto de Herschel S. Hall (Cleveland, Ameriko). Prezo: 0.05 sm.

N.º 2. *Tra la loko ensorĉita*. — Novelo originale verkita en Esperanto de J. Ŝirjjev (Ivan Malfeliĉulo). Prezo: 0.03 sm.

Librejo *Esperanto*. Lubjanskij proezd, 3. Moskvo. Rusujo.

Augsburg. — La juvelo de germana renesanco kaj unu el la plej interesaj urboj de Germanujo. Ilustrita prospekto eldonita de la *Fremdenverkehrsverein Augsburg* laŭ instigo de la delegito de U. E. A. Petu ĝin al Snr. Fernando Kuher, Annastrasse D 222. Augsburg. Allemagne.

Patroj kaj Filoj. — J. S. Turgenev. Tradukis el la rusa lingvo D-ro K. Bein (Kabe). Librejo «Esperanto». 26, Tverskaja. Moskvo. Rusujo. Prezo: 2.50 fr.

Katalogo de Moskva Librejo «Esperanto». 6ª eldono. 26, Tverskaja. Moskvo. Rusujo.



KORESPONDADO

Bernardo Herškovie — Vanatori, 6 — Bukuresto — Rumanio, deziras interŝanĝi il. poŝtkartojn.

LA MOVADO

Monata Universala Gazeto (Propagando, Informo, Komercio, k. t. p.)

L' Esperantiste Français

Bulletin officiel de la Société Française pour la propagation de l'Esperanto.

Redakcio. — Administracio: 61, Bd. St — Marcel. Paris.

Jarabono. fr. 3,25 (S m 1,300)



Curso Elementar de Esperanto em 28 lições por

M. Mendes e C. Fernandes

PREÇO 1\$500

A venda nas principaes livrarias e na Sêde do Brazila Klubo «Esperanto», á Avenida Rio Branco n. 153. 2º andar. — Rio de Janeiro.

POŝTA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA INTERNACIA LIGO DE ESPERANTISTOJ POŝTOFICISTOJ (ILDEPO:) — Aperas ĉiumonate; enhavas fakan kvarlingvan vortaron (germana-franca-angla-Esperanta), fakan frazaron, fakajn artikolojn pri poŝto, telegrafo, telefono kaj recenzojn pri literaturo, ĉu beletristika ĉu scienca. Diversnacia kunlaborantaro. Senpage sendata al Ildepaj membroj; jara kotizo: 1 sm; abonprezo kun sendkostoj: 1 sm pojure.

Oni sin turnu al la Ildepa oficejo ĉe — *Arnold Behrendt*, Breslau (Germanujo).

MAXSTRASSE 22.

Konto: Ĉekbanko Esperantista.



Scienca Gazeto

Internacia monata revuo pri Scienco kaj Industrio. Oficiala organo de la *Internacia Scienca Asocio Esperantista*.

Redakcio: Ch. Verax, 55, boulevard Arago, Paris (XIII) Administracio Hachette & Comp. 79 boulevard Saint-Germain, Paris. Jarabono 7,50 fr.—3 sm.



O Brasil Philatelico

Revista literaria, mensal, ilustrada dos colleccionadores de sellos, cartões postaes e dos esperantistas, com circulaçao em todo o mundo.

Unica, no genero, no Brasil.—4º anno.— Assignatura annual, com direito a premios, 3\$000.

Cada numero traz, além de varios artigos sobre o Esperanto, sellos e cartões postaes, grande numero de anuncios de colleccionadores de todo o mundo.

Sem demora, peçam um numero specimen, que, com prazer, sera enviado pelo seu director-proprietario,

Dr. Benjamin C. Camozato,
EM Cachoeira (RIO GRANDE DO SUL)

CHAVES DE ESPERANTO

CENTO 4\$000

AVENIDA RIO BRANCO, 153 — 2º ANDAR

TARIFO POR ANONÇOJ

1 Paĝo Sm. 15.....	20\$000
1/2 » 8.....	12\$000
1/4 » » 5.....	7\$500
1/8 » » 3.....	4\$000
Por 2 foĵa anoncado rabato da 15 %	
Por 3 »	20 %
Por 6 »	30 %



OFICIALA GAZETO ESPERANTISTA

Organo de la Lingva Komitato kaj de la Konstanta Komitato de la Kongresoj
 Jara abono 5 fr.
 Aperas ĉiumonate, krom en Septembro.
 Ĉiuj esperantistoj devas ĝin aboni.
 Redakcio kaj administracio:
 51, rue de Clichy,—Paris.



Ĉiumonata internacia gazeto

Orienta Azio

estas la sola, bela gazeto kun kolorigitaj ilustraĵoj, en Japanujo, Hinujo kaj Koreujo, kaj ĉiu monate aldonas unu de «mem lernantojn de Japana aŭ Ĥina lingvoj, aŭ diversaj katalogoj. Jarabono: 1.20 sm; duonjare 0.60 sm; provnumero 0.10 sm. (Ni ne ricevas poŝtmarkojn, krom Japana) Sin turni al la REDAKCIO «Seikaigo ŝoin» Osakimaĉi, Ebaragun, Tokio.
 Japanujo



ITALA LINGVO

Per Esperanto

Itala Lingvo estas tiel simila al Esperanto ke ĉiu Esperantisto povas per nur unu leciono ĝin legi, per dudek lecionoj ĝin kompreni.

Sekve revueto «L'Esperanto» iniciatas instruon de lingvo itala per ĉiulandaj Esperantistoj, ĝin prezentante sub esperanta alfabeto.

Lecionoj aperas regulare la 10.an kaj la 25.an de ĉiu monato.

Abonu sendante 1 Sm. al Eldonisto :

A. PAOLET — S. Vito al Tagliamento
 (Udine-Italujo)



Vortaro Esperanta-Portugala

KOMPILITA DE TOBIAS R. LEITE

Um volume in 16, 176 paĝa..... 1\$500

Aĉetebla ĉe

Francisco Alves & C.

166, rua do Ouvidor.—Rio de Janeiro.



LINGVO INTERNACIA

Monata Centro Organo de la Esperantistoj nur en Esperanto (48 p. 13 X 20)

Jara abono 5 fr. (2 Sm)

Administracio: Presa Esperantista Societo.
 # 33, rue Lacépède, Paris.




LA REVUO

Internacia literatura Gazeto. Kun la konstanta kunlaborado de Dro. Zamenhof.

Jara abono 7 fr.

Redakcio kaj Administracio: Librejo Hachette & C., 79, Boul. S. Germain. Paris.



DR° JOSE ARTHUR BOITEUX

ADVOKATO

Strato Hospicio, 24

RIO DE JANEIRO



LIVROS

Na séde do Brazila Klubo, á Avenida Rio Branco n. 153, 2° andar, encontram-se á venda os seguintes livros :

- Brazilio*. Parolado de Sro. E. Backheuser..... 1\$000
 - Methodo theorico e pratico do esperanto* por Honorio Rivereto 1\$000
 - Lina*, comedia, por Pedro A. Coutinho 1\$000
 - Esperanto*. Conferencia do Dr. Antonio C. de Arruda Beltrão..... \$500
 - Karlo*, facila legolibro, de Privat.. \$500
 - Parizina*, poema de Byron, esperantigita de Dr. Venancio da Silva 1\$000
 - Chaves de Esperanto*..... \$050
 - Curso Elementar de Esperanto*, por M. Mendes e C. Fernandes..... 1\$500
- Ha tambem cartõespostaes de propaganda, pelo preço de 50 rs. cada um, ou 600 rs. e 800 a dúzia.



Livros em Esperanto

Aĉam-se á venda na Livraria Jacintho Silva, á rua Rodrigo Silva n. 7, na Papelaria Ideal, á rua Sete de Setembro, 163 e na Livraria Gomes Pereira, r. Ouvidor, 91, diversos livros em Esperanto.